

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago №10, Oktobro, 2008

*Kara Leganto! Jen, post dusemajna ripozo en Eŭropo – lulilo de nia kara lingvo, mi sukcese revenis kaj denove pretas servi al vi. Hodiaŭa nia numero enhavas raportojn de la Societaj membroj, loĝantaj tra la tuta mondo. La unuan verkis Mikaelo Jones (filo de la karmemora Kent Jones – multjara animo de l' nia E-societo), kiu dum la longa tempo instruas la anglan en Ĉinio . La duan raporton prezentas senlaca Karlo Offutt, nia respondeculo pri la klub-sidejo. Do, bonan legadon! Tempo forkuras rapide, jam estas Oktobro kaj denove nia estraro devas okupiĝi pri salono por la sekvanta Zamenhofa Tago-festo. Vivu Esperanto en Ŝikago!!!*

*Araneo*

## Kvin Uzoj de ESPERANTO Por La Ĉina

1. Esperanto povus ebligi por ĉinaj infanoj lerni la anglan de la denaskaj anglaj parolantoj, anstataŭ melperfekte lerni ĝin de ĉina instruisto de la angla. La metodo estas simpla: dekomence intruu infanojn Esperantojn kaj, de la dua flanko, oni postulas de instruanto el Okcidento esti Esperantisto, t.e. – posedi IL-on. Poste la instruistoj povas uzi Esperanton por paroli kun ĉinaj infanoj pri la angla.

2. Ĉiu granda urbo havu Esperanto-klubon. Do, se junuloj el Ĉinio iras eksterlanden por lernado, ili tuj havos amikojn en fremda urbego, se ili posedas Esperanton. Le metodo estas simpla: ili iru al la Esperanto-klubo de tiu urbego. La E-klubo ĉiam sincere, kun plezuro akceptas novajn E-amikojn.

3. Junaj homoj, vojaĝantaj turisme tra la mondo, povus ĝui gastemecon de la lokaj Esperantistoj, kio estas avantaĝo antaŭ mendo de multekosta hotela ĉambro (tio ĉi estas konata kiel "Pasporta Servo").

4. Renkonti aliulojn estas la afero, kiun ŝatas fari junuloj. La plej bona loko, kie gejunuloj de diversaj landoj povas renkontiĝi sen sperto de la lingva bariero, estas ĉiujara Universala Kongreso de Esperanto.

5. Uzado de Esperanton kiel perilo multe helpus por studentoj kompreni nuancoj de la angla. Klarigante al lernantoj diferencon inter frazoj "He stopped to eat" kaj "He stopped eating", oni devas traduki ambaŭ Esperanten: "Li haltis por manĝi" kontraŭ "Li ĉesis manĝi".

## LASTE OKAZIS .......

Dum la lasta kunsido de nia Esperanto-societo estis montritaj fotojn de Karlo Offutt, kiuj prezentis du lastajn (ĵus renovigatajn) niajn juniajn piknikojn. Poste etis pridiskutita la Iran-Usona politiko kaj Roberto konatigis nin (per du kompaktdiskoj) kun arkitektutaj allogaĵoj de tiu lando, interesaj por turistoj. Enhavriĉa kaj kolorplena ilustrado faris senforgeseblan spuron en niaj animoj.

*Karlo Offutt*



**Radio Vatikana 4000-foje Elsendis**

La 5-an de oktobro 2008 Radio Vatikana disaŭdigos sian kvarmilan elsendon en Esperanto. La unua elsendo okazis en la nokto inter la 17-a kaj la 18-a de aprilo 1976 kadre de la paska programo "Kun ni en la nokto". La unua elsendo konsistis nur el kelkaj vortoj de meditado, legitaj de s-ino Elizabeta Rzemnyi-Puracchio. Laŭ la planoj ĝi devis esti pli ampleksa kaj komenciĝi duonhoron pli frue, sed pro la escepte longa daŭro de la paskaj ceremonioj oni devis lastmomente limigi la daŭron kaj prokrasti la elsendon.Ekde la 25-a de aprilo 1976, kontraue, estis disaudigata kvinminuta programo, registrita de Elizabeta Rzemnyi-Puracchio kaj de patro Giacinto Jacobitti. Sekvis pli ampleksaj kaj regulaj elsendoj ekde la 2-a de januaro 1977. Pli da informoj pri la elsendoj troviĝas en la retejo de la esperantlingva redakcio.

**Korespondi Deziras...**

61-jara kubano (esperantiĝis en 1987) deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Jose Luis Montes de Oca, Cardenaz, Calle Independencia # 186-B, Santo Domingo, Villa Clara, Cuba-53000

## Nian Urbon Vizitis Litova Esperantisto

S-ro Alfredas Maruŝka, la litova renoma esperantisto, kuracisto, vizitis Ŝikagon kun sia amikino dum 3 tagoj en la lasta 13a de Oktobro. Li gastiĝis ĉe la hejmo de s-ro Les, nia membro, kaj Puramo CHONG, Gregroy Dolgin kune ĝuis komunan vespermanĝon.




**Adreso (provizora)**

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

**Estraro:**

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

**MEMBROKOTIZO**

Membro-subtenanto ; $40 jare;
Familia membro : $30, Regula: $20
Studenta aŭ pensiula: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

**KUNSIDO**

**okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:**

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

## Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

28an de Oktobro – "Ukrainio en mia koro", prezentas V. Pajuk
25an de Novembro – Esperanto en ne-movadaj revuoj, preparis s-ro Gregory Dolgin
14an de Decembro – Zamenhofa Tago, BANKEDO
27an de Januaro – Henry Dunant, samtempulo de L. Zamenhof

